

Pri kelkaj esperanto-gazetoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 januaro 09 kaj 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

La esperanto-gazetoj, kiujn ni ricevadas tra la kanalo de Svisa Radio Internacia, ofte altiras nian atenton pere de citindaj artikoloj. Jen hodiaŭ laŭtleĝo de tri el ili :

A.- La bulteno de Katolika Esperanto-Centro en Milano, en sia aŭgusta numero anoncas, ke la papo parolis en esperanto kaj precize citas liajn vortojn. Jen tiu artikolo :

Cl.- "Kiu estis ĉe la televido la 15-an de aŭgusto por sekvi la papon dum lia vojaĝo en Pollando, havis la grandan surprizon aŭdi lin paroli en esperanto. Du fojojn lia papa moŝto Johano Paŭlo dua parolis en la internacia lingvo: je la komenco li diris: "Mi donas ankaŭ en esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama patro en la nomo de Kristo, vero de la homo !" La duan fojon la sankta patro tiel elbuŝigis la finan saluton: "La sperto de kredo travivita ĉe la piedoj de la "Nigra Madono" restu neforigebla gravurita en viaj koroj. Sanktega Maria akompanu vin !"

A.- Plurfoje aŭskultantoj skribis petante klarigojn pri la uzo de la vorteto po. Jen ni trovis en la organo **Internacia Pedagogia Revuo**, dua numero de 1991, citindan artikolon de Odd TANGERUD, Norvegio:

Cl.- Zamenhof prenis la prepozicion **po** el la rusa lingvo. De tiu momento ĝi estas Esperanta vorto, kaj devas esti traktata kiel tia kaj laŭ Esperanta lingvosento. Li decidis, ke po regu nombron aŭ esprimon de mezuro. Li donis la ekzemplon: "Ili ricevis po kvin pomoj." Bedaŭrinde li ne donis iun gramatikan analizon de la frazo, por tiel klarigi kial li ne uzis la akuzativon, ĉar temas ja fakte pri objektoj, kiujn oni ricevas. Li nur skribas: "...ambaŭ esprimoj estas uzeblaj kaj bonaj..." Tio kondukis al la stato, ke gramatikistoj donis malsamajn regulojn pri la uzo de **po**. Mi multe cerbumis por trovi solvan klarigon kaj jen ĝi en tiu ĉi artikoleto.

A.- En la ekzemplo de Zamenhof la verbo „ricevis” estas transitiva. Oni do atendus rektan komplementon post ĝi, sed tia komplemento ne ekzistas. La esprimo „po kvin pomoj” estas adverba esprimo de mezuro. En tiu esprimo „pomoj” ne estas rekta komplemento, kaj sekve ne havu la finaĵon -n. Ĝi estas parto de la mezuro kaj ludas adverban rolon en prepozicia esprimo. La frazo de Zamenhof do ne estas kompleta gramatike, ĉar mankas al ĝi rekta komplemento. Se ni aldonas tian komplementon, ni havos jenan frazon: „Ili ricevis pomojn po kvin pomoj.”

Cl.- Ĉar la rekta komplemento kaj la substantivo de la mezuro estas la samaj vortoj, unu el ili estas superflua por la kompreno kaj por la eleganteco de la frazo. Zamenhof preferis forstreki la rektan komplementon kaj reteni la substantivon de la mezuro. Tamen eblas ankaŭ forstreki la substantivon de la mezuro se la senco estas klara. Ekzemple: „Ili kunprenis la pomojn po kvin.” Jen mi retenis la rektan komplementon, kaj kripligis la esprimon de mezuro, ĉar ĉiuj komprenas, ke temas pri „po kvin pomoj”.

A.- La esprimo de mezuro respondas al la demando „Kiel?”, do adverbale respondas. Se mi skribas „Ili kunprenis po kvin.”, neniuj komprenas, pri kio temas. „Po kvin” estas kripligita esprimo de mezuro. Aŭ ni konservu la rektan komplementon, aŭ ni skribu la kompletan esprimon de mezuro.

Cl.- La rekta komplemento devas sekvi la transitivan verbon, kaj tiel antaŭi la esprimon de mezuro. Ekzemplo: „La plenkreskuloj kunprenis la infanojn po tri.”

A.- Izolite „po tri” ne donas iun signifon, sed ĉar mi ne bezonas skribi la kompletan komplementon „la infanojn”, mi ne bezonas skribi la kompletan mezuran esprimon, ĉar ni scias pri kio temas.

La organo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Aŭstrio, aperas nun sub la titolo "**La dua jarcento**". Jen el la numero 157 ni citas informojn ne tre kuraĝigajn pri la iompostioma detruigo de la papero.

Cl.- Kio restos de ni? Per la invento de la rotacia presilo en la lasta jarcento la libroproduktado ricevis fortan antaŭen-puŝon. Presado fariĝis malmultekosta kaj rapidega. Baldaŭ oni frontis problemon: La disponebla papero ne sufiĉis. Necesis do trovi novajn procedojn pli efikajn en la paperproduktado. Oni sukcesis - tamen riskante malavantaĝon, kiun en sia tuta amplekso oni konas nur hodiaŭ: Ekde proksimume 1850 produktiĝis papero aĉ-kvalita, enhavanta tro da acido kaj tro da ligneca substanco. Tiu papero jam post cent jaroj komencas malstabiligi kaj ekas procedo de lanta, tamen konstanta disfalo. Kaj imagu: En la bibliotekoj de la mondo tiel kadukiĝas kaj ruiniĝas en la paso de kelkaj jardekoj milionoj kaj milionoj da libroj. **Kaj preskaŭ nia tuta Esperanta literaturo estas presita sur tiu disfalema papero.** Eĉ la Unua Libro.

A.- La savo. En la lastaj jaroj oni evoluigis metodojn konservajn, kiuj povus agi kontraŭ la kadukiĝo de la papero. Tio kondukis al partaj sukcesoj, sed la entreprenendaj dispozicioj estas multekostaj, temporabaj kaj dependas de granda aparataro. Konsiderante la rimedojn en Esperantio, ni devas konstati, ke preskaŭ neniuj privatulo aŭ asocia biblioteko disponas pri la rimedoj necesaj por kontraŭbatali la plej drastajn perdojn. Sed jes la Internacia Esperanto-Muzeo, kiu - kiel parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko - povas kunlabori kun ties konservista instituto. Tio signifas, ke IEM sukcesos protekti siajn trezorojn.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND legis al vi artikolojn ĉerpitajn el esperanto-gazetoj. Ĝis reaŭdo !